INTERNACIA MEDICINA REVUO

Oficiala Organo de TUTMONDA ESPERANTISTA KURACISTA ASOCIO (T. E. K. A.)

Monata ligilo de la kuracistoj, farmaciistoj, dentistoj kaj aliaj medicin-rilatantaj profesianoj.

13a Jaro | N-ro 4/6a | Aprilo-Junio 1935

ENHAVO

OFICIALAJ INFORMOJ

XXVIIa Kongreso de Esperanto T. E. K. A. kunsido 13

ORIGINALAJ ARTIKOLOJ

per psikologia terapeŭtiko 14

AUTOREFERATOJ

D-ro Godoy TAVARES (Rio de Janeiro, Brazilo). : La bismuto, la arseniko, la kupro kaj la hidrargo kiel ekspektorigiloj 18

REFERATOJ

R.-C. CHAPERON kaj M. PINON (Caen, Francujo): Kontribuo al studo de vejna anestezo per natria Evipano. — D-roj BOURGUIGNON kaj HUMBERT : Kuracado de la iŝiatika neŭralgio per la dielektrolizo de kalcio. — Doc. D-ro Vr. JONAS: Kuracaj rezultoj ĉe Basedow-malsano en periodo de kompleta aritmio kaj kor-insuficieno. — Doc. D-ro V. JONAS, as. D-ro E. MARKALAS: Studo de folikla hormono ĉe hipertireozo 19

APOTEKISTA ANGULO

A. PAFOMOV (Serpuĥov, USSR) : Receptura Kazuitiko. — Laboratoria sapo. — V. MAĤOVER (Arĥangelsk) : Ĉeriza Siropo 21

DIVERSAĴOJ

D-ro BRIQUET (Lille) : Medicina terminaro kaj esperanto 22
D-ro J. WELEMINSKI (Praĥa) : Eminentaj kuracistoj sur poŝtmarkoj 23
Oni demandes... Oni respondas... 24
Nekrologo 24
Esperantista kroniko 24

Adreso: 19, avenue Montjoie, Uccle 3 (Belgujo)

PANBILINE

HEPATAJ
MALSANOJ

RECTOPANBILINE

MALLAKSO

HÉMOPANBILINE

ANEMIOJ

Specimeno kaj Literaturo :

LABORATORIO de la Doktoro **PLANTIER**
ANNONAY (Ardèche) France

INTERNACIA MEDICINA REVUO

DEKTRIA JARKOLEKTO

1935

OFICIALAJ INFORMOJ

XXVII KONGRESO DE ESPERANTO EN ROMO

T. E. K. A. Kunveno

Merkredon, la 7-an de aŭgusto 1935, en la kvina tago de l'Kongreso, posttagmeze, okazos la TEKA-kunveno en la Kongresejo (Palaco de la Universitato) en Romo.

Krom la raportoj pri la administraj aferoj de TEKA, estas atendataj sciencaj komunikoj, kaj estas aranĝataj vizitoj al ĉefaj medicinaj instalaĵoj de la urbo, inter kiuj la nova Sanatorio « Carlo Forlanini ».

Por taŭge aranĝi la detalojn de la kunveno kaj de la vizitoj, estas necese koni plej baldaŭ la proksimuman nombron de la partoprenantoj.

Oni petas do ĉiujn kuracistojn, apotekistojn, veterinarojn kaj interesatojn (studentojn, flegistojn, k.t.p.) anonci sian partoprenon al la organizanto de la kunveno : D-ro P-ro Giorgio Canuto, *ĉe* Esperanto-Centro Itala, Gall. Vitt. Em. 92, Milano.

Ankaŭ oni petas la kolegojn kiuj deziras anonci sin por scienca referaĵo, sendi plej baldaŭ la titolon de la priparolata temo al la sama adreso.

.....

ORIGINALAJ ARTIKOLOJ

KAZO DE ASTMO RESANIGITA PER PSIKOLOGIA TERAPEŬTIKO,

de D-ro Allan WORSLEY (Birmingham-Anglujo).

La sekvanta kazo meritas apartan intereson, ĉar ĝi montras, ke specoj de astmo ekzistas, kiuj estas kuraceblaj per psikologiaj metodoj, ankaŭ ke kuracado kelkafoje povas esti multe mallongigita.

Antaŭe okazintaj faktoj.

La paciento estis Birminghama knabo, K. T. 12-jara. Li estis sendita al mi de D-ro Keating. Li estas la sola infano de la familio.

Antaŭ Oktobro 1931, li havis normalan sanon kaj normalan temperamenton, kvankam li estis iomete timema, nervoza, kaj facile ekscitiĝis.

Iun Dimanĉon dum Oktobro 1931 li ĝenis sin pri la solvo de krucvortenigmo. Lia patrino sugestis al li la vorton « Vipon ». Li ŝajnis kontenta kaj iris la liton feliĉa.

Dum la nokto li subite leviĝis. (kredeble en stato de sonĝo), kaj eliris la domon. Li vagadis tra la stratoj. Li reiris frue matene, sed ne memoris tion, kio okazis. Li estis nur duone konscia pri ĉio, kion li faris.

Tiun matenon li havis sian unuan atakon de astmo, kun ĉiuj la kutimaj klasikaj simptomoj. Li insistis, ke oni malfermu ĉiujn fenestrojn, kaj multe deziris eliri en la freŝan aeron.

Sento kvazaŭ en kaĝo aperis, kaj li baraktis pene spiradante. Aŭskultante lian bruston, oni aŭdis la kutimajn sonojn de longigitaj fajfaj elspiradoj.

Depost tiam li ofte suferis atakojn, du-tri ĉiusemajne. La atakoj komencis matene frue. La plej severaj okazis Dimanĉe.

Lia temperamento ankaŭ ŝanĝiĝis. Li iĝis timema, precipe pri riveretoj kaj hundoj. Li timis ludi piedpilkon. Li iĝis ekkoleriĝema, kaj ribela kontraŭ siaj gepatroj. Ankaŭ li estis trompema, suspektema, mensoga, kaj evitis la kunulecon. Lia vizaĝo portis malaman rigardon.

Li iĝis depremita, melankolia, kaj ekploris sen kaŭzo.

Mi unue vidis lin la 30an de Septembro. Per mia speciala tekniko, (poste klarigota), vico de subpremitaj memoroj preskaŭ tuj ekfluis.

Priskribo pri la resanigo.

Dum la unua semajno de la kuracado, la atakoj iĝis malpli severaj. Dum la dua semajno, ili pliseveriĝis, sed forpasis pli rapide ol kutime. Dum la tria semajno ĉesis la atakoj, sed revenis kiam lia kuracisto ĉesis preskribi efedrinon. Tial oni denove donis efedrinon al li. Li daŭris ĝis la oka semajno sen atakoj, esceptinte du malgrandajn atakojn. Dum ĉi tiu tempo, li prenis efedrinon ĉiutage. Post la oka semajno, li ĉesis preni efedrinon, kaj restis libera de atakoj. Kompreneble dum ĉi tiu tuta tempo li ricevis psikologterapeŭtikon senĉese de mi.

Dum la naŭa semajno li suferis dent-eltiron, sed feliĉe sen inciti atakon. Dum la dek-unua semajno, okazis malgranda atako, kaŭzita, miaoponie, per tio, ke li estis vipita (kvankam tre malforte) en la lernejo, ĉar li ne korekte faris siajn kalkulojn. Ankaŭ kredeble malhelpis lin la komencanta nebula vetero. Sed ĉi tiu atako estis malsevera, kaj ne daŭris.

Dum la dek-dua semajno, li severe malvarmumiĝis, kaj suferis bronkiton.

Ĉi tiu incitis severan atakon de astmo kun laŭta fajfa elspirado. Tamen, ĉi tiu estis absolute la lasta atako, kaj depost tiam, li tute ne havis denovan atakon de astmo. Mi ĉesigis mian kuracadon la 24-an de Marto 1933, t. e. ses monatojn post kiam mi komencis psikologian terapion.

Mi estas ofte vidinta lin post tiam, sed mi neniel devis denove kuracadi lin. Li restis tuta libera de astmo. Mi vidis lin antaŭ ne longe, kaj trovis lin sana kaj feliĉa. Kio egale plaĉis al ni estis tio, ke lia temperamento aŭkaŭ resaniĝis. Li nun estas feliĉa kaj sentima knabo, havanta dek kvar jarojn. Li nun partoprenas ĉiujn ludojn, kaj antaŭ ne longe li ricevis premion en naĝad-konkurso, montrante, ke li tute venkis sian timon pri akvo. Hejme li nun estas obeema, kaj respektema; lia vizaĝo portas gajan mienon.

Li kelkafoje malvarmumiĝas kaj du fojojn havis bronkiton. Unufoje li estis punita en la lernejo per vipado spite miajn ordonojn sed malgraŭ ĉio nedefektite. La astmo neniam revenis. Li senŝirmiĝis al ĉia vetero sen remalsaniĝi. Tial, ni povas esti certaj, ke li nun estas tute resanigita.

Kuracado.

Devas esti komprenite, ke mian diskuton pri kuracado mi devas fari kiel eble plej mallonga. Manko de spaco malhelpas, ke mi klarigu multe pri tekniko, metodoj, k.t.p. Mi esperas eble alian fojon doni plilongigitajn detalojn pri la teknik-metodo. Mi nur petas je la momento, ke miaj legantoj akceptu ĉiujn menciitajn faktojn, kiel pruvitajn per mia sperto en tiu ĉi specialeco.

Koncize dirite, la kuracadmetodo estas bazita sur la metodo priskribita kaj iniciatita de la mortinta D-ro Hugh Wingfield de Londono.

Li atribuis kelkajn simptomojn, (kiel astmo, vaginismo, fobioj kiel klaŭstrofobio kaj aliaj fobioj k.t.p.), al subpremita memoro.

Io, kio okazis en infaneco kaŭzis al la paciento plenan mensan emocion. La emocio povas esti aŭ timo, aŭ malĝojeco, aŭ malamo, aŭ alia. La memoro iĝinte dolorega, estis forpremita de la konscio. Ĝi subpremiĝis en la subkonscian menson, kaj restas tie forgesita. Sed kvankam forgesita ĝi ankoraŭ vivas, kaj kaŭzas la simptomojn.

La kuracado de la simptomoj konsistas el tio, ke oni devas revoki la memoron denove en la konscion Rememorinte la perditan memoron, la paciento tuj, (aŭ preskaŭ tuj), resaniĝas, kaj perdas sian simptomon.

Kelkafoje la rememoro kaŭzas mensan doloron, sed pliofte ne. Ĉiuokaze post la rememoro, la paciento sentas grandan senŝarĝiĝon.

Mi multe disvolvis la teorion de Wingfield, kaj estas evoluinta pli certan teknikon, kiu produktas pli precizajn rezultojn ol tiujn akiritajn de Wingfield. Ankaŭ flanke dirite, Wingfield opiniis, ke oni devas uzi la hipnotismon por revoki la subpremitajn memorojn. Mi tamen neniam, kaj neniel uzis hipnotismon; malgraŭ tio, mi venigis pli multe da memoroj je unu kazo, ol Wingfield.

Laŭ mia tekniko, la paciento kuŝiĝas, fermas la okulojn kaj premtenas la manon de la « operaciisto ». Li tiam komencas pensi apart-maniere (t.e. disasociat-maniere). Geknaboj povas facile tion fari.

Plenaĝuloj kutime bezonas iom da instruado, pri apartigo, antaŭ ol povi revenigi ian subpremitan memoron. Plu pri ĉi tiu en estonta artikolo.

El mia sperto, (kompare kun tiu de Wingfield), mi trovas, ke la plejmulto da pacientoj havas ne unu, sed multe da subpremitaj memoroj.

En kelkaj el miaj kazoj, mi trovis kvardek, sesdek, kaj eĉ pli ol cent subpremitajn memorojn.

Kutime la memoroj dividas sin en tri aŭ kvar grupoj, ekzemple, unua grupo de memoroj pri akvo kun dronaj travivaĵoj : dua grupo pri faloj aŭ akcidentoj : tria grupo pri punadoj k.t.p. Ne ĉiam la samaj grupoj kiel ĉi tie diritaj, eble aliaj grupoj kaj alia vico.

La subpremitaj memoroj de unu grupo elfluas serie, kiel ĉeneroj ĝis elvenas la origina (baza) forgesita travivaĵo.

Tiam komencos alia grupo sammaniere, ĝis oni atingas la deziritan originan memoron. Tiam komencos tria grupo k.t.p.

Ĉiuj tiuj subpremitaj memoroj similas al «mensa absceso». Tranĉite, ĝi komencas dreni ĝis ĝi estas malplena de subpremitaj memoroj. Samtempe, la paciento sentas multe da senŝarĝiĝo.

Supozu, ke la origina memoro estis drona travivitaĵo. Ĝia subpremo kaŭzas ĉiujn pluajn travivitaĵojn, aŭ rakontojn pri drono, kiuj okazis eĉ autaŭ malmulte da semajnoj.

La subpremitaj memoroj estas enirintaj la menson, kaj konservitaj tie, same kiel la bildetoj en kinematografa filmo. La unua travivaĵo eniras unue, kaj la lasta laste kompreneble. Ili revenos je kontraŭa vico, nome, la lasta travivaĵo estos la unua el la revokotaj memoroj, kaj la origina travivaĵo revenos laste. La simptomo de-

CALCIUM-SANDOZ

La granda antaŭenpaŝo de la **Kalciterapio,**

per vojoj:

STOMAKA
bone tolerata kaj asimilata

VEJNA
rapida agado

MUSKOLA
je efikaj dozoj

POSTULU LITERATURON KAJ SPECIMENOJN DE FABRIKO DE ĈEMIAJ PRODUKTOJ antaŭe SANDOZ BALE-BASEL 13 (Svisujo).

Julien BITTNER

Fabrikanto de ĥirurgiaj instrumentoj

1, rue des Fabriques, Bruxelles (Belgujo).



Ekstera fiksilo de D-ro Conn (1/3).

De Trouette-Perret

APHLOÏNE
Specifa rimedo kontraŭ la malordoj de la Menopaŭzo kaj de la vejna aparato.

LA
NISAMÉLINE
(GUAKO)
Jukoj-Ekzemoj-Prurigoj
Neŭralgioj

LA
PAPAÏNE
Gastro-Enteritoj-Laksoj
Vomoj
Dispepsiaj malordoj

PARIS — 15, Rue des Immeubles-Industriels — PARIS

Laboratorioj BRUNEAU kaj K^io
(MARKO TRIOLLET)
PARIS — 17, Rue de Berri, 17 — PARIS

LIGILOJ STERILAJ AŬ NE
Katgutoj — Firenzaj Haregoj — Silkfadenoj — Linfadenoj — Bronzfadenoj

KAŬĈUKAJ ARTIKOLOJ KAJ GANTOJ
"Cutiplaste" BRUNEAU
SPARADRAPO KUN ZINKOKSIDO PERFEKTE ALGLUIĜANTA
Agento por Belgujo : **Marcel DU BLED, 192, rue des Palais, Bruselo**

VARIKOJ — FLEBITOJ — HEMOROIDOJ
CIRKULADAJ MALORDOJ — HIPERTENSIO
KONĜESTAJ STATOJ DE LA MENOPAŬZO

HAMAMELIODE

(Malŝanĝema Kombinaĵo de Jodo Kaj Hamamelo)
X gutoj da Hamameliode entenas ekzakte 0,01 da Jodo tute kombinata kun 0.25 da ekstrakto je egala pezo da vegetaĵo.
Dozoj: 30 ĝis 50 gutojn potage, en du aŭ tri fojoj.

Laboratorio OBERLIN, 17, rue Cadet, Parizo
J. TINARDON, unuaklasa apotekisto el Altiernejo de Parizo.

REZORCIN PERKUTOL

loka antihidrotika rimedo kun surprize fidinda efiko.

Originalaj boteloj, kun 10 kaj 30 gramoj.

ĤEMIA FABRIKO REISHOLZ, G. M. B. H., Duesseldorf-Reisholz
(Rejnlando)

pendanta de la subpremita memoro ne malaperos, ĝis la originala (baza) memoro estas plene revokita. Tre malmulte da kazoj montras seksajn memorojn; ĉiuokaze nur kiam la origina memoro estis seksa travivaĵo en si mem.

Ĉi tiu knabo revenigis kun mia helpo kvardek ok memorojn.

El tiuj, la unua ĉeno estis akvo kaj drono, kaj finiĝis ĉe origina memoro (je la aĝo de 4 jar.), en kiu li vidis viron dronitan, kaj la kadavron eltiritan el la maro. Li montris multe da timo ĉe la revenigo de ĉi tiu memoro.

La dua ĉeno konsistis el serio da memoroj pri vip-punado, finiĝinta ĉe origina memoro (je la aĝo de 2 1/2 jaroj), kiam lia patrino manfrapis lin tial, ĉar li falis el sia liteto. (Ĉi tie komencis la komplekso pri vipado, punado, kune kun faloj, kaj la komenco de la malsano el tio, ke lia patrino sugestis la vorton « Vipo ».)

Alia memoro estis, ke lia patro batis lin (aĝa 4 jaroj); je tiu okazo li deziris forlasi la hejmon (komparu komencon de la malsano).

Post la reveno de tiuj ĉi subpremitaj memoroj, la knabo perdis siajn timojn pri faloj, altajoj, akvo, naĝado, kaj punado.

Iom pli malfrue mi revenigis alian originan memoron, ĉi tiun fojon, ke li estis enŝlosita (je la aĝo de 5 jaroj) en malluma ĉambreto de siaj infanaj kunuloj. La reveno de ĉi tiu memoro estis plena de teruro, dum li denove (sed mense) sentis la mallumecon, la senaeran atmosferon, kaj la solecon. (La klaŭstrofobiaj ĉenoj estas ĉiam la plej doloraj.)

Post ĉi tiu memoro, li ĉesis barakti por aero dum siaj tiamaj astmaj atakoj, samtempe perdis la deziron foriri el la hejmo. Li ne plu plendis pri tio, ke li sentis sin kvazaŭ en fermita en mallarĝa spaco, kiel kaĝo.

Post la reveno de la punad-memoroj, li perdis sian defian manieron kontraŭ siaj gepatroj; anstataŭ li iĝis obeema kaj akiris sunan temperamenton.

Entute li ricevis dek sep kuracadojn de mi.

Kelkafoje liaj sonĝoj alportis al mi utilajn indikojn al la serĉantaj memoroj.

Mi ŝuldas miajn dankojn al la kolego, kiu transsendis la kazon al mi por la speciala kuracado, ankaŭ por la permeso publigi la kazon.

Postparolo :

La ĉi tie priskribitan kazon mi nur elektis pro ĝia simpleco. Sed ĝi neniel estas fenomeno. Mi havis sukceson kun aliaj pacientoj suferantaj pri astmo, ĝis la aĝo de 18 jaroj. Ju pli junaj la pacientoj, des pli simpla la kuracado.

Alia kazo estis fraŭlino 18jara, sed en ŝia kazo, mi nur atingis plenan sukceson kun iom da kunmiksita psikologi-analizo, (laŭ la kutimaj konataj metodoj).

Miaj aliaj sukcesoj koncernas aliajn malsanojn, sed en ĉi tiu verko, mi limigis min al la temo de astmo sola.

Rilate al gepacientoj, kiuj suferis de astmo longatempe, oni ne

povas promesi sukceson. Kiam oni trovas organikajn ŝanĝojn en la pulmoj, la malsano preterpasis la limojn de espero por plena resaniĝo per ĉi tiu metodo.

Kompreneble estas ĉiam necese malfermi iajn sepsajn fokusojn, ekz. antrumo, tonsiloj, k.t.p., antaŭ ol akcepti kazon por kuracado per psikologia-terapeŭtiko.

.....

AŬTOREFERATOJ

D-ro Godoy TAVARES (Rio de Janeiro, Brazilo). — **La bismuto, la arseniko, la kupro kaj la hidrargo kiel ekspektorigiloj.** (El *Vida Medicina, Rio de Janeiro*, oktobro, 1934.)

615.721.

La parolanto priskribas, kiel li alvenis al la konkludo ke la bismuto, la arseniko, la kupro kaj la hidrargo estas ekspektorigaj. Li diras ke antaŭ kelkaj jaroj, studante la hidrargon, li publikigis ke ĝi estas efika kontraŭ la nesifilisaj gastropatioj, kontraŭe de la centjara erara opinio.

Ĉar oni ne akceptis lian vidpunkton , li uzis la pilokarpinon kaj konstatis ke estas pli rapida, kelkafoje en minutoj, la efiko de tiu medikamento kontraŭ, ekzemple, gastralgio. Poste li publikigis, ke la salvarsano povas malaperigi gastralgion, en minutoj, laŭ la dozo.

Li argumentis ke, se temas pri sifiliso, tiu terapeŭtika provo estas centfoje pli bona por la esploro de la sifiliso ol la Reakcio de Wassermann.

Publikigante sian laboron pri la interferenco por klarigi la terapeŭtikan agon li diris ke, bazitaj sur la teorio de la interferenco oni povus eltrovi novajn medikamentojn. Hodiaŭ li klopodis por doni ekzemplon.

Konstatinte ke la solvebla bismuto, per injektoj, multe pligrandigas la sekrecion de la faringo — kaj tial alieciĝas la normala stato — kaj ke ĝi naskas diversajn stimulojn ĉe la mukozo estigante anatomian staton malsaman ol la ordinaro, li pensis profiti tiun difekton de la kuracado per la bismuto en la batalo kontraŭ diversaj malsanecaj statoj de la laring-traĥe-bronka mukozo.

Kiel la solvebla bismuto, sed en malpli granda grado, li uzis la arsenikon, la hidrargon kaj la kupron.

.....

REFERATOJ

R.-C. CHAPERON kaj M. PINON (Caen, Francujo). — **Kontribuo al studo de vejna anestezo per natria Evipano.** (El *Le Phare Médical de Paris*, n-ro 144, dec. 1934.)

616 -089.5 -032 : 611.14

Nova anestezilo (per envejna vojo) estis sukcese uzita de kelkaj germanaj ĥirurgiistoj, nome D-roj Specht el Kiel, Baetzner el Berlin, Ernst el Munich; oni ĝin nomas « *natria Evipano* ».

La aŭtoroj ĝin provis, kaj jen iliaj konkludoj :

Por la mallongaj operacioj, ne pli ol 8-10 minutaj, uzu sole Evipanon. Por la 15-20 minutaj operacioj, uzu plie morfinon. Por la longaj operacioj, kunuzu Evipanon kaj kloralon. Kutima dozo ĉe forta viro : 8 ĝis 10 kubcentimetroj. Netoksa, agrabla por la ĥirurgiisto kaj por la malsanulo, ĝi estas tute rekomendinda.

Aldonaj sciigoj : la postoperaciaj vomoj estas maloftaj, ankaŭ la pulmaj komplikaĵoj. Ofte, kiam oni envejnen injektas malrapide la Evipanon, la malsanulo jam dormas post injekto de 2 aŭ 3 kmc. Ne uzu Evipanon ĉe infanoj; ĝi taŭgas komence de la 20a jaro. kaj estas bone tolerata de la maljunuloj. Evipano utilas por la frakturoj, flegmonoj, faciaj operacioj ĉar oni evitas la uzon de masko, por la uretera kateterizo, 1/2 aŭ 1 horon antaŭ la operacio, permesas operaciojn pli longajn. Por la tre longaj operacioj, Chapenro kaj Pinon donas al la paciento, 1 1/2, 1, kaj 1/2 hor. antaŭ la operacio, unu supkuleron da Kloral-siropo, sume 3 grm. da kloralo.

M. BRIQUET (Lille).

D-roj BOURGUIGNON kaj HUMBERT. — **Kuracado de la isĥiatika neŭralgio per la dielektrolizo de kalcio.** (El *Journal de Radiologie et d'Electrologie*, Oct. 1934.)

616.833.58 -009.7 -085.845.6

Jen la tekniko uzita depost 13 jaroj de la aŭtoroj : Ĉiutaga seanco 30 minutojn-daŭra dum 6 tagoj, poste 3foje semajne, sume 15 seancoj; ĉesu 3 semajnojn, kaj refaru novan serion da seancoj. Lokalizo de la elektrodoj varias laŭ la isĥiatikaj neŭralgioj. Se temas pri isĥiatika neŭralgio *funikla*, apliku elektrodon sufiĉe longan sed ne pli ol 2 aŭ 3 cm-larĝan, ĉe lumbo-sakra vertebraro, nivele kun la kuniĝaj truoj; tiu (pozitiva) elektrodo enspacos de la 2a sakra vertebro ĝis la 3a au 4a lumba, se nur la isĥiatiko estas malsana, sed, ĝis la 1a lumba, se la tuta plekso estas dolora; metu la duan elektrodon ĉe la Skarpa' triangulo. Intenseco : ne pli ol 4-7 miliamperoj. Uzu solvaĵon je 1% da kalcia klorido ĉe la elektrodo kunligata kun la pozitiva poluso.

Se temas pri isĥiatika neŭralgio *radika*, t. e. lokalizata en la vertebrara kanalo, apliku elektrodon pozitivan, sorbigitan de la

kalcia solvaĵo, ĉe la okuloj, uzante kaŭĉukan plataĵon kun du malgrandaj truoj (1 aŭ 1,5 diametraj), por ke la medikamento trapasu nur tra la okuloj; metu la duan elektrodon ĉe la vertebraj kuniĝaj truoj lumbo-sakraj. Intenseco : 2 ĝis 2 miliamperoj.

Se la neŭralgio lokiĝas sur la nervo mem, t. e. se ĝi estas *trunka*, apliku la pozitivan elektrodon ĉe la lezita parto, la negativan, kontraŭe, ĉe la alia flanko de la membro. Maksimuma intenseco : 10 Mili.

Samtempe, perbuŝen, receptu, 2 horojn antaŭ ĉiu seanco, kaj, vespere, la senseancajn tagojn, 2 grm. da kalcia klorido.

Rezultoj : 259 kazoj, 83% da resaniĝoj. Komence, kelkfoje, oni observas pligraviĝon de la doloro, sed tio rapide ĉesas; malofte la tria serio estas necesa.

La aŭtoroj opinias ke tiu kuracado estas elektinda kontraŭ la ishiatika neŭralgio, ĉefe kiam temas pri la vario dirita reŭmatisma, kaj kiam temas pri la radika formo (Fr. *Radiculite*). En tiu ĉi okazo la sukcesoj estas tiel oftaj ke, si vi malsukcesis, serĉu ĉu temas pri organa lezo najbara persistiganta la neŭralgion.

BRIQUET (Lille)

Doc. D-ro Vr. JONAS. — **Kuracaj rezultoj ĉe Basedow-malsano en periodo de kompleta aritmio kaj kor-insuficieno.** (El *Prakticky lékar*, 1934, paĝo 125.)

616.44 -008.61

La aŭtoro resumas kuracajn rezultojn ĉe kompletaj aritmioj kaj asistolioj akompanantaj morb. Basedowii. [52 kazoj.] 19 kazoj montris kompletan aritmion sen klaraj signoj de delkompenso kaj estis kuracataj aŭ per kor-medikamentoj aŭ nur antitireoide aŭ fine kombine. Li akiris almenaŭ malplirapidiĝon de ventrikla ritmo, sed li sukcesis nek en unu kazo, escepte tiujn, ĉe kiuj vibrado (fibrilado) estis nur pareksisma, ŝanĝigi vibradon (fibriladon) de vestibloj en sinusan ritmon. Ceteraj 33 malsanuloj estis kuracataj en periodo de asistolio ree aŭ per kormedikamentoj aŭ kombine. Per plilongdaŭra donado de jodo aŭ Lugolsolvaĵo aŭ en dijodtirozino kun intermita digitala kuracado li sukcesis akiri plilongdaŭrantajn pozitivajn rezultojn.

Sed la aŭtoro konsideras internan kuracadon kiel ne kontentigan, kvankam per jodo kun dijodtirozino estas eble plibonigi kondiĉojn par sukcesa efiko de kor-medikamentoj. Tial li opinias, ke pravas literaturaj sciigoj, precipe amerikaj, konsilantaj radikalan operacion eĉ en kazoj de asistolio, ĉar rezultoj estas pli bonaj ol ĉe interna kuracado.

D-ro MAREK (Ml. Boleslav).

Doc. D-ro V. JONAS, as. D-ro E. MARKALAS. — **Studo de folikla hormono ĉe hipertireozo.** (*Prakticky lékar*, Praha, 1934, paĝo 643.)

616.44 -008.61

En interna kliniko de P-ro D-ro Hynek kaj en instituto por eksperimenta patologio studis la aŭtoroj menciitan demandon. Ili

Kripke

Eumattan

HAUSCREME

LA ANTISEPSA
BONODORA

HAŬTKURACILO POR
LA MANOJ
DE LA KURACISTO

GRANDA DOZO
MALMULTEKOSTA
AGRABLE PARFUMITA

Kripke, Dr. Speier & Co.,
Berlin (Germanujo) Admiralstr. 18 E

Esperantistoj !

Vi deziras havi unufoje esperantan gazeton redaktata de profesiaj ĵurnalistoj.

Via revo realiĝis!

Jen aperis la plej malmultekosta esperanta gazeto

Nia Gazeto

sendependa organo, libera por ĉiuj, monata, grandformata, ekpaĝa, ilustrata.

Direktoro : Georges AVRIL.

Ĉefredaktoro : S. GRENKAMP-KORNFELD.

Abonprezo : 12 fr. fk.

Provnumero kontraŭ respondkupono de poŝto aŭ de UEA.

NIA GAZETO, Nice (Francujo)
29, avenue de la Victoire

ABONOJ.

Ni memorigas al niaj legantoj ke la jarabono kostas 5 svisajn frankojn (aŭ egalvaloron). Ni petas niajn abonantojn, ke ili bonvolu repagi sian abonon, ĉu al sia landa kasisto, ĉu senpere al la administracio de I. M. R., per poŝtmandato aŭ per ĝiro sur la poŝtĉekkonton 28.14.51 de I. M. R. Paganto de triobla kotizo ricevas I. M. R. en luksa eldono kaj la titolon de subtenanta membro.

*
* *

MEDICINAJ VOJAĜOJ

La Asocio de la belga medicina gazetaro aranĝas vojaĝon en Centra Eŭropo, okazontan de la 16a de aŭgusto ĝis la 10a de septembro. La partoprenantoj revenos surmare, de Istanbul al Marseille. La prezoj estas moderaj; rabato al la kuracistoj kaj al ilia familio. Por ĉiuj informoj, sin turni al Medicinaj Vojaĝoj kaj Krozadoj, 29, boulevard Adolphe Max, Bruxelles (Belgujo).

Atentu!

La abonoj komencas de n-ro 1 (januaro).

Abonprezo por unu jaro : 5 svisaj frankoj aŭ ekvivalenta sumo. Sendo de almenaŭ triobla kotizo rajtigas ricevon de *luksa eldono*.

Dumviva membro de T. E. K. A. ricevas luksan eldonon de I. M. R. kaj ĉiujn ĝiajn eldonaĵojn. Kotizo : dudek kvin usonaj dolaroj.

Kiel aboni?

En POLUJO, oni pagu la abonprezon al D-ino MUSZKATBLAT, Str. Wspolna, 8, Warszawa.

En JAPANUJO, oni pagu la abonprezon (3.50 japanaj jenoj) al D-ro URA — RYOOZI, Eskulapida Klubo, Anatomia Instituto, Imperia Universitato de Tokio, TOKIO.

El ĈIUJ ALIAJ LANDOJ, oni pagu senpere al la ADMINISTRACIO de I. M. R. ĉu per internacia poŝtmandato, ĉu per sendo de unudolara monbileto (aĉetebla en ĉiu lando ĉe monŝanĝisto) en registrata letero, ĉu per sendo de 20 internaciaj poŝtaj respondkuponoj.

La posedantoj de poŝtĉekkontoj en Aŭstrujo, Belgujo kaj Belga Kongolando, Ĉeĥoslovakujo, Danujo, Danzigo, Francujo, Germanujo, Hungarujo, Italujo, Japanujo, Jugoslavujo, Latvujo, Luksemburgo, Maroko (krom la hispana teritorio), Nederlando, Polujo, Svedujo, Svisujo. povas pagi per internacia ĝiro al nia poŝtĉekkonto n-ro 2814.51 en Bruselo. Ĉi estas plej simpla, malmultekosta kaj tempoŝpara pagmaniero.

Kiel kvitancon, la Administracio tuj sendos membrokarton.

La Administracio.

ALIĜILO.

Resendota al administracio de I. M. R., 19, avenue Montjoie, Uccle 3 (Belgujo).

Mi aliĝas al T. E. K. A. kaj deziras ricevi I. M. R. dum la jaro 1935 (ordinara-luksa eldono).

Mi deziras ricevi ..... ekzemplero(j)n de la Teknika Medicina Vortaro.

Mi sendas : (1) ĉi kune — samkuriere mian jarabonon (1) — **10 belgojn, 5 svisajn frankojn** — (1) aŭ ekvivalentan sumon, t.e. ... al (1) Administracio de la I.M.R. — D-ino Muszkatblat, Warszawa — D-ro Ryoozi URA, Tokio — per (1) monbileto — poŝtmandato — poŝta ĝiro sur belgan poŝtĉekkonton n° 2814.51 de Internacia Medicina Revuo, Bruxelles — poŝta ĝiro sur polan poŝtĉekkonton 12.651 de D-ino Muszkatblat, Warszawa.

(1) *Forstreku ne konvenajn indikojn.*

Nomo : ..... Autaŭnomoj : .....
(substreku la ĉefan)

Profesio : .....
(se eble, aldonu vian specialan fakon)

Universitataj titoloj : .....

Adreso : .....

Strato : ..... N° .....

Loko ..... Provinco, Departemento : .....
(urbo, vilaĝo, ktp) :

Lando : ..... Mondparto : .....

Dato : .....

Subskribo : .....

celis konstati kvanton de folikla hormono en urino de virinoj kun hipertireozo aŭ en periodo de kompleta evoluo de malsano aŭ dum remisio kaj kontrolis siajn trovojn kun trovoj ĉe sanaj virinoj. Ili konstatis : 1) pli malgrandajn kvantojn de folikla hormono en urino de virinoj kun hipertireozo kaj eĉ ĉe tiuj, kiuj konigis laŭregulan menstruacion. 2) dum remisio de Basedow-malsano estis la kvanto de fol. hormono iom pli granda ol en kompleta evoluo de malsano. 3) per kontrola analizo eĉ la sama malsanulino dum pliboniĝo de malsano en unu kazo estis trovita plimultiĝo de fol. hormono en urino kontraŭ periodo de kompleta evoluo, ĉe alia la eliminigo ne pligrandiĝis.

D-ro MAREK (Ml. Boleslav).

APOTEKISTA ANGULO

RECEPTURA KAZUISTIKO

Se vi dissolvas koncentratan solvaĵon de $MgSO^4$ kaj Na^2CO^3, se ili estas solvitaj en *varma* akvo, tuj aperas precipitato de $MgCO^3$. Se kontraŭe la saloj estas solvitaj en *malvarma* akvo, nur post du aŭ tri tagoj aperos kristaloj de $MgCO^3$.

*
* *

LABORATORIA SAPO

Pr/ Blanka argilo (simpla el tero sen sableroj) : 1000 grm.
Kalia karbonato (K^2CO^3) : 20 grm.
Fluida ekstrakto de saponario : 50 grm.

Miksu kun akvo, por fari ne tre molan mason.
Dividu en pecetojn po 100 grm.
Oni povas parfumigi ĝin aldonante :
Pr/ Nitrobenzolo : 2 grm.

A. PAFOMOV (Serpuĥov, USSR).

ĈERIZA SIROPO

615.414

La infankuracistoj tre ofte preskribas fluidan miksaĵon de jena konsisto :

Rp. de Sodo 1.0
distilakvo 20.0
Siropo Simpla 5.0
S. Prenadi po tekuleroj.

Laŭ unua vido ĉi tiu fluida miksaĵo estas tre simpla, tamen ĝi ludas gravegan rolon kiel neŭtraliganto de liberaj acidoj amasiĝant-

aj en stomakintesttrakto de malsana infano. Pri seriozeco de nomita miksaĵo atestas la jena malĝojiga fakto; unufoje ekvolis la kuracisto aliformigi la recepton kaj anstataŭ la suprecititan preskribis jenan receptan :

Kp. de Sodo 1.0
distilakvo
Siropo ĉeriza..... ââ 15.0

Eltrinkinte kelkajn kulerojn de l'miksaĵo la infano mortis, ĉar la poma acido troviĝanta en la siropo ĉeriza plene neŭtraligis la sodon kaj la lasta ne povis neŭtraligi la troaĵon de acidoj en infana stomakintesttrakto, kaj nur tiun celon povis celi la kuracisto preskribinte la fluidan miksaĵon al la malsana infano.

V. MAĤOVER (Arĥangelsk).

DIVERSAĴOJ

MEDICINA TERMINARO KAJ ESPERANTO

de D-ro BRIQUET (Lille).

Oni ofte skribis pri la difektoj de la medicina terminaro. La *Federacio de la latina medicina Gazetaro* decidis penadi por ĝin modifi; tiucele ĝi komisiis kelkajn anojn por starigo de Vortaro, kies ĉiuj vortoj havos perfektan etimologion; por unuigi la terminologion oni utiligos la grekan lingvon. D-ro Makridès, meritplena kuracisto en Ateno, estas nomita ĉefo de la komisiono; li konstatis ke, el la 6.000 medicinaj vortoj de la Vortaro de Soj Garnier kaj Delamare, pli ol 4.000 estas grekdevenaj. Ne konkludu, ke, por akiri perfektan terminaron, sufiĉos krei iom malpli ol 2.000 vortojn; tute ne, ĉar, inter la 4.000 vortoj, kiuj estas el greka origino, tute aŭ parte, oni devas noti ke :

1. Estas vortoj tre malkorektaj, kiujn oni devos ŝanĝi; tiaj estas, laŭ la opinio de nia greka kolego : Asistolio, Sindromo, Fobio, Amiotrofio, Anatoksino, Anafilaksio, Fagocitozo, k. t. p. (Legu Umfia, n-ro 5, 1934).

2. Estas hibridoj, parte grekdevenaj, parte latindevenaj; ili estas monstroj, kaj oni scias ke en Lacedemono oni ilin ne toleris; do, oni modifos : Dekstrokoreco, Ekstrasistolo, Koro-okula, Pelviperitoneito, Larmogenera, k. t. p.

3. Estas vortoj malbone formitaj laŭ la etiologio, ekz : Hemofilio, Skizofrenio, Ciklotimio, Astigmatismo, Katarakto, k. t. p., aŭ tute malbonaj kiel Hemoklasio.

D-ro Makridès nur konservos la vortojn kiuj estas tute korektaj; preskaŭ ĉiuj devenas de la verkoj de Hipokrato aŭ de Galieno; ekz., inter aliaj : Kaĥeksio, Manio, Ascito, Podagro, Tetano, Iktero, Pneŭmonio, Dispneo...

Oni povas konkludi ke la entreprenita tasko ne estas simpla; eĉ oni povas diri ke ĝi estos verŝajne longa, kaj malfacila; tamen ĝi

ŝajnas ebla. Sed supozu ke oni fine starigis terminologion tute perfektan, ŝirmitan kontraŭ iu ajn kritiko (?); restos ĝin akceptigi, kaj ĝin utiligi de ĉiulandaj kuracistoj... tien ĉi amasiĝos la malfacilaĵoj. La medicinaj vortoj, neperfektaj laŭ la lingvistiko, estas, malgraŭ tio, uzataj, kaj komprenataj de ĉiuj; la plej multaj el ili estas kvazaŭ-internaciaj; estos vera revolucio kiam oni devos subite ŝanĝi la tri kvaronojn de nia terminologio; estos ĥaosa periodo vere sen agrablaĵoj !

La *Federacio de la latina medicina Gazetaro* elektis, kiel bazo, la grekan lingvon, sed jam estas, pri tio, malkonkordo. En Italujo, dank'al la influo de la fascismo, oni konstatas revivigon de la latina lingvo, kaj la Instituto de la romanaj studoj estas komisiita por la starigo de Leksikono italo-latina, en kiu ĉiuj teknikaj vortoj estos tradukitaj el la klasika latino, almenaŭ proksimume. Ĉu, kiam tia leksikono estos starigita, la Italoj akceptos la vortaron de la porgreka komisiono ?

Sed ni ne, ĝis nun, aludis la nelatindevenajn popolojn. La reprezantantoj de ilia medicina Gazetaro ne estis konsultitaj pri la elekto de la greka lingvo. Nune (ĉu ne estas iom malfrue ?) D-ro Makridès proponas ke estu kunvokataj, en Atenon, kelkaj kuracistoj el diversaj anglo-saksaj kaj slavaj nacioj, kaj el Turkujo, el Egiptujo. Li ne citas Japanujon kiu, tamen, ludas, en medicino, sufiĉe gravan rolon. Sume oni proponas al ni duan Societon de Nacioj !!! Senutile akcenti.

Verŝajne, multaj jaroj (aŭ centjaroj?) trapasos antaŭ ol nova medicina terminologio perfekta estos akceptita, kaj utiligata, de ĉiuj. Pro tio, en esperanto, oni preferis ne eterne atendi; oni prenis ĉiujn medicinajn vortojn nune internacie akceptitaj, kaj oni donis al ili esperantan formon, per ortografia simpligo, per unuformaj vortfinoj (O por la substantivoj, A por la adjektivoj), per uzado de derivaĵoj, de sufiksoj, k. t. p. sume, de ĉio kio faris la esperantan lingvon tiel praktika. En la *Esperanta Teknika Medicina Vortaro,* eldonita en 1932, estas pli ol 3.600 vortoj, kun iliaj derivaĵoj; ĝia uzado ĝin montris tute taŭga, ĉar oni povis, ĝin uzante, skribi multajn artikolojn pri la plej diversaj medicinaj temoj; tiuj artikoloj estas legitaj, facile komprenitaj, kaj ofte tradukitaj sialingven de kuracistoj el ĉiuj nacioj, poloj, rusoj, japanoj, k. t. p. Ĉu oni povas plie fari, en nia epoko, kiam ĉiuloke la naciistoj bataladas, kaj forte malhelpas al ĉiu provo de unuigo sur iu ajn agokampo. Esperanto posedas grandan avantaĝon; ĝi estas neŭtrala.

(El *Le Phare Médical de Paris,* n° 145.)

Ni petas niajn eksterlandajn kolegojn, ke ili traduku la bonegan artikolon de D-ro Briquet, kaj ke ili klopodu aperigi sian tradukon en la ĉefaj medicinaj gazetoj de sia lando.

EMINENTAJ KURACISTOJ SUR POŜTMARKOJ

En la oktobra numero de la jaro 1934 de la *Folia Medici,* eldonita germanlingve de la fabriko de farmaciaj preparaĵoj, « Norgine » en Praha, aperis artikolo de P-ro D-ro J. S. Sterba-Böhm pri « eminentaj kuracistoj sur poŝtmarkoj », kiu enhavas ilustraĵojn de 13

poŝtmarkoj, inter ili la ruslandan poŝtmarkon kun la portreto de Zamenhof. En la teksto mallonga priskribo de la vivo de ĉiu el la 13 kuracistoj klarigas ilian famon. Pri Zamenhof estas skribitaj jenaj linioj :

« En U.S.S.R. poŝtmarko estis eldonita en la jaro 1927 por rememoro de la kvardekjara ekzisto de Esperanto kun la bildo de Lazaro Ludoviko Zamenhof (1859-1917). Post fino de la medicinstudado li ekloĝis en sia hejmurbo Varsovio kaj en la jaro 1887 li eldonis sub la pseŭdonimo « D-ro Esperanto » instruskribon pri internacia artefarita lingvo, kiun li nomis « Lingvo Internacia ». Ĝi estas la sola artefarita lingvo, kiu hodiaŭ, sub la nomo Esperanto, estas disvastigata sur la tuta mondo. »

... WELEMINSKI (Praha).

ONI DEMANDAS... ONI RESPONDAS...

En tiu nova rubriko, ni klopodos akiri, por tiuj abonantoj, kiuj tion deziros, specialajn informojn pri temoj speciale interesaj por ili. Sukceso de tiu rubriko dependas de la respondoj ricevataj. Tiu el niaj legantoj, kiu estas speciale kompetenta pri la aludita temo, aŭ kiu povas havigi bibliografiajn informojn, konsciu pri sia morala devo sendi informojn al la redakcio, kiu ilin publikigos kiel eble plej rapide. Ili tiel donos novan pruvon de la utileco kaj eĉ de la neceseco de Esperanto en la internaciaj sciencaj rilatoj.

*
* *

Temo I. — Osteito fibreca de la makzelo.

616.716.8 -006.379.4

Estas deziratai : kaz-historioj, se eble kun rezultoj de sang-analizo (kalcia enhavo); rentgenogramoj, mikroskopsekcioj; sciiigo ĉu en la diritaj kazoj kunestas lezoj en aliaj ostoj aŭ paratirojda malsano; sciigoj pri la kuracado kaj rezultoj de ĝi.

*
* *

NEKROLOGO

Ni sciiĝis pri la morto de D-ro STEINSBERG, el Franzensbad (Ĉeĥoslovakujo), multjara abonanto de I. M. R.

Nian plej koran kunsenton al lia familio.

*
* *

ESPERANTISTA KRONIKO

JUGOSLAVUJO. — D-roj CRLENJAK kaj MARUZZI parolis dum rememor-kunveno aranĝita por la Zagreba Esperantistaro okaze de la morto de la Reĝo Aleksandro la.

INTERNACIA MEDICINA REVUO

Internacia Medicina Revuo estante sendependa diskutejo, nek aprobas nek malaprobas la ideojn de siaj korespondantoj, kiuj sole respondas pri la opinioj esprimataj kun ilia subskribo.

La redakcio rezervas al si la rajton mallongigi la manuskriptojn kaj korekti ilin, sed nur laŭ lingva vidpunkto.

La senditaj tekstoj estu, se eble skribitaj *permaŝine;* almenaŭ ili estu *klare* skribitaj. Ne publikigitaj ili ne estas resendataj. La aŭtoroj de originalaj artikoloj ricevos laŭeble 25 represigojn de sia verko.

Reproduktoj kaj traduktoj estas nur permesataj kun *indiko de deveno.*

ABONOJ

Sin turni al la landaj kasistoj de T.E.K.A., aŭ senpere al la Administracio. Ĉiuj abonoj komenciĝas de la n-ro 1. *Ordinara eldono* kostas, por unu jaro, 7.20 belgojn (36 belg. frank.) *Luksa eldono,* sur baritpapero, estas rezervata al la subtenantaj membroj, kiuj pagos almenaŭ trioblan kotizon.

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO

19, Avenue Montjoie, UCCLE 3 (Belgujo)

Poŝtĉekkonto: Bruxelles n° 2814.51. — Telefono 44.53.11.

HONORA PROTEKTANTARO

Belgujo: P-ro I. GUNZBURG. — *Ĉeĥoslovakujo:* P-roj KADLICKY kaj OSTRĈIL. — *Danzigo:* P-ro PETRUSZKY. — *Francujo:* P-roj CALMETTE kaj RICHET. — *Germanujo:* P-roj H. STRAUSS kaj VIERORDT. — *Japanujo:* P-roj FUJINAMI, MOCHIZUKI, NISHI kaj OGATA. — *Poluio:* P-roj BUJWID kaj WRZOSEK. — *Sovetunio:* P-roj KABANOV, LYSENKOV kaj SHCHERBAK.

ĈEFREDAKTORO : **Profesoro VANVERTS** (Lille).

KUNLABORANTARO

D-ro ALECHINSKY (Bruxelles); P-ro ASADA (Nagasaki); D-ro AUSTERLITZ (Bardejow, Ĉeĥoslovakujo); D-ro BABADAGLY (Kiev); D-ro BLASSBERG (Krakov); D-ro BOKARIUS (Harkovo); D-ro BORUCHOWICZ (Warzawa); S-ro BOUCON (Annecy); D-ro BOURG (Bruxelles); D-ro BRIQUET (Lille); D-ro BULYOVSZKY (Kiskunmajsa, Hungarujo); P-ro CANUTO (Torino); P-ro CARBONE DOMENICO (Milano); D-ro CUGIO ARAI (Tokio); D-ro DROUET (Paris); D-ro FELS (Lwow); D-ro GOGITIDZE (Leningrad); D-ro GOLDBAUM (Lodz); D-ro JAGI (Kioto); D-ro KEMPENEERS (Bruxelles); D-ro KOLOMOJCEW (Tallinn); D-ro KRENICKI (Warszawa); D-ro KRYNSKI (Warszawa); D-ro KURMIS (Riga); D-ro LINK (Saint-Louis, Usono); D-ro MAEDER-LÖFFLER (St. Gallen); D-ro MAES-DUBOIS (Bruxelles); Farm. MAHOVER (Arkangelsk); D-ro MONTI (Milano); D-ino MUSZKATBLAT (Warzawa); P-ro NISHI (Tokio); P-ro OGATA TOMIO (Tokio); D-ro OMELSKYJ (Cernauti, Rumanujo); D-ro PACE (Specia, Italujo); D-ro PENCIK (Harkovo); D-ro PRZEDBORSKI (Warszawa); D-ro ROBIN (Warszawa); Farm. ROUSSEAU (Bécon-les-Bruyères, Francujo); D-ro SKALSKIJ (Leningrad); D-ro ŜIPIN (Voroneĵ); D-ro SUPIN (Leningrad); D-ro TANKOW (Soĉi, Kaŭkazo); D-ro VAN BECELAERE (San Diego); D-ro VAN DER BIEST (Bruxelles); D-ro WELEMINSKY (Praha); Farm. WILTSCHEK (Bratislava); S-ro WOODRUFF (London); D-ro LEONO ZAMENHOF (Warszawa); D-ro ADAM ZAMENHOF (Warszawa); D-ro ZURKOWSKI (Kielce, Polujo); k. t. p.

ANONCOJ

M. WITTENBERG, 23, Gieselerstrasse, Berlin (Germanujo).

TUTMONDA ESPERANTISTA KURACISTA ASOCIO (T.E.K.A.)

ESTRARO

Prezidanto : D-ro W. ROBIN, 113 Marszalkowska, Warszawa. — *Vic-Prezidantoj :* P-ro NISHI, Tokio, kaj Dro BLUTH, Neuenahr. — *Ĉef-sekretario:* D-ro KEMPENEERS, 19, avenue Montjoie, Uccle 3. — *Ĉef-kasisto:* D-ro G. CANUTO, via Pallamiglio, 15, Turino 116. — *Redakcianoj de I. M. R.:* P-ro VANVERTS (Lille), D-roj ROBIN (Warzawa), BRIQUET (Lille), KEMPENEERS (Bruxelles) kaj BLASSBERG (Krakow). — *Estraranoj:* D-roj FELS (Lwow), ULMAN (Mukaĉevo), VAN BECELAERE (San Diego).

LANDAJ KASISTOJ

Francujo: D-ro BRIQUET, rue Solférino, 34, Lille (Poŝtĉekoj: Lille 30.25). — *Germanujo:* D-ro RENKEN, Häfen, 26, Bremen. — *Japanujo:* D-ro RYOOZI-URA, Anatomia Instituto, Medicina Fakultato, Tokio. — *Meksikio:* D-ro AMBROSIO VARGAS, 7a de Bravo, 95, Mexico, D. F. — *Polujo:* D-ino MUSZKATBLAT, Str. Wspolna, 8, Warzawa (Poŝtĉekkonto 12.651). — *Svisujo:* D-ro WANNER, avenue Georgette, 1, Lausanne.

KONSULOJ

Danujo: D-ro J.-H. Leunbach, Stockholmsgade, 39, Kopenhago. — *Finlando:* D-ro Salokannel, Salminen st. — *Francujo:* D-roj Cotar, Vichy; Dardel, Aix-les-Bains; Gros, Apt (Vaucluse). — *Germanujo:* D-ro Schwab, Pariserstr. 3, Berlin W. 15. — *Grekujo:* D-ro Stamatiadis, Rodou 21, Atano. — *Hispanujo:* D-ro Bremon Masgraŭ, Carrer Balmes 102, Barcelona. — *Litovujo:* D-ro J. Kovarskis, Merkine, Alytus. — *Japanujo:* D-ro Yagi Hideo, Medicina Fakultato Imperia Universitato, Kioto; D-ro Tomasaburo Ogata, Patologia Instituto, Tokio. — *Jugoslavujo:* D-ro Crlenjak, Palmotiĉ str., 20, Zagreb. — *Polujo:* D-ro Leon Zamenhof, Marszlakowska, 125, Warzawa. — *Sovet-Unio:* D-ino M. Fomina, Rustaveli, 15 Batum (Kaŭkazo); K-do Snejko, poŝtkesto 33, Minsk (Blankrusio); D-ro Babadagly, Zolotovorotska, 6/30, Kiev; D-ro Skalskij, Jelabova, 1/56, Leningrad. — *Usono:* D-ro Van Becelaere, East Talmadge Drive, 4633, San Diego (Kalifornio).

Profilaksa Vagina Desinfektilo

Internacia protektita fabrik-marko

en sengrasaj, solveblaj premaĵoj

INDIKOJ :

Kontraŭ blanka fluo, metrito kaj erozioj.

Specimenoj kaj literaturo senpage al kuracistoj :

TEMMLER-WERKE

Berlin-Johannisthal

(GERMANUJO)

Imprimerie Médicale et Scientifique (Soc. An.), 34, rue Botanique, Bruxelles. — Tél. 17.16.49.

KUL